

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 324 (90) KVINA EPOKO

OKTOBRO-DECEMBRO 2002



**ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO**  **KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO**
Apartat, 290 - 08200 - SABADELL
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL, Literatura Foiro, Heroldo, La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Litova Stelo, Scienca Revuo (ni peras ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 1008-08200 SABADELL (Vallès Occidental)
Catalunya/Katalunio Tel.93-710 96 36 Fakso: 93-716 36 33

Ret - adreso: kea@esperanto-ct.org

Ret - paĝo: <http://www.esperanto-ct.org>

Kotizoj por la jaro 2002: Individua Abonanta Membro 25 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 50 eŭroj; Individua Dumviva Membro 500 eŭroj; Kolektiva Membro 50 eŭroj; Juna Membro 16 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona – Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; vicprezidanto: Joan Inglada; kasisto kaj provizora sekretario: Llibert Puig; komitatanoj: Roger Prieto, Anna Casasús, Arnald Massanas.

Kontrola Komisiono: Sebastià Ribes, Òscar Puig, Xavier Murcia.

Kataluna Esperantisto: Llibert Puig, Marina Ollé. Revizianto: Hektor Alos i Font.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona
Imprès a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91
Dipòsit Legal: B-27362 - 1982



KONTRAŬ LA MILITO EN IRAKO

**Prelego de Lluís Garcia
prezidanto
Kataluna Esperanto-Junularo**

**sabaton, la 1an de februaro, 18a h.
Klubo de Amikoj de Unesko
Mallorca, 207, pral.
Barcelono**

Ordinara kaj Eksterordinara Asembleoj

Sabaton la 15an de februaro je la 17a h. ĉe Unesko-Klubo okazos duobla asembleo: eksterordinara kaj tuj poste ordinara. La eksterordinaran asembleon celas modifi kelkajn artikolojn de nia statuto. Ni kunsendas kun la revuo la devigan kunvokilon.

Marta prelego

La naŭtika inĝeniero Marcos Salas el Ĉilio, kiu restos du semajnojn en Barcelono por labori en la Kataluna Politeknika Universitato, prelegos al ni sabaton la 22an de marto 2003 je la 18a h. ĉe Unesko-Klubo pri "Turismaj vidindaĵoj de Ĉilio", kun prezento de lumbildoj.

Kongresa T-ĉemizo

Restas ankoraŭ kelkaj unuoj de la kongresa T-ĉemizo, eldonita okaze de nia Kongreso en Sóller. Ni ofertas ilin al nia membraro je la avantaĝa prezo de 6 eŭroj (sendkosto inkluzivita).

Nekrologo

La 3an de julio 2002 forpasis preskaŭ 95-jara (ŝi naskiĝis aŭguste de 1907) la kataluna veteranino Antònia Galbany, vidvino de Antoni Criach, kiu loĝis en Calella de antaŭ multaj jaroj.

(Ĉi-apude, lastatempa foto de Antònia Galbany kun nia kasisto Llibert Puig, kiu vizitis ŝin de tempo al tempo)

31a Kataluna Kongreso

Por kongresi en la 31a Kataluna kaj 4a Transpirenea Kongreso de la 31a de oktobro ĝis la 3a de novembro 2002, al la fama baleara insulo Majorko aflugis kaj alŝipis sesdeko da esperantistoj. Krom la katalunoj, en la agrabla urbeto Sóller la kongreson kaj la belajn sunajn tagojn ĝuis ankaŭ la partoprenantoj el Britio, Francio, Germanio, Italio, Kroatio, Portugalio kaj Svedio.

La internacieco de la kongreso (pli ol la kvinono da eksterlandanoj) estis tre aprezita. Kiel oficialajn gastojn KEA koncertigis Gianfranco Molle el Italio kaj la katalunan ensemblon "Kaj Tiel Plu" gvidantan de Xavier Rodon kaj prelegigis Paul Gubbins (Britio) kaj Višnja Branković (Italio/Kroatio). Kiel kunredaktoro, la brita gasto prezentis la internacian magazinon en Esperanto *Monato* kaj kiel verkisto de teatraĵoj la provokan prelegon: "Esperanto-teatro: kiam la kurteno leviĝos?". Kadre de la kongresa temo "Malgranda estas bela", Višnja Branković rakontis pri "Hum, la plej malgranda urbo en la mondo". Post la prelego de kataluna IKEF-ano Josep Franquesa pri malgrandaj entreprenoj kaj la propra entreprenista evoluo, ŝi parolis pri unupersonaj firmaoj, ankaŭ prezentante la ekzemplon de la propra priesperanta entrepreno Orbis Pictus el Triesto. La atenteman aŭskultantaron pensigis ankaŭ Hektor Alos per la prelego "Lernado de fremdaj lingvoj: kiucele?".

En la agrabla kongreso sen temporabaj ceremonioj kaj laciga jarkunveno, karakteriza estis ankaŭ la partoprenantaro ĉiugeneracia. Aparta malkovro por multaj estis la kreema kaj produktiva Majorka Esperantistaro (la LKK), kiu prezentis: hejmecan filmeton *Malgrandaj vilaĝetoj de Majorko*, kongresan T-ĉemizon kaj saketon kun spritaj desegnaĵoj de David Martinez Moll, poemlibreton *La balkanaj* de Albert Herranz Hammer (prezentitan kiel recitalon dum la arta vespero) kaj libregon de historiisto Xavier Margais *El moviment esperantista a Mallorca (1898-1938)*. La libron (kiu estas nur la resumo de la doktoriĝa disertacio), la aŭtoro mem solene prezentis en la malgranda urbodoma salono, ankaŭ kiel omaĝon al la

pioniroj de la movado en Sóller (Miquel kaj Andreu Arbona).

Al ĉiu interesita kongresano ili ebligis simplan senpagan loĝadon en la kongresejo, la kulturejo "Dolĉa Domo". Efike ili kunlaborigis la urbestaron, precipe la honoran komitatanon s-ron Guillem Bernat Ferrer. Kiel kultura konsilanto li ĉiutage praktike helpis la kongreson, ĉu mem ĉeestante la akceptadon aŭ de la urbestro regalan bufedan vespermanĝon, ĉu kunkantante kun la urba popolgrupo, ĉu ĉiĉeronante tra la urbo! Fine, la majorkanoj banketigis nin en la sama restoracio, en kiu tagmanĝis ankaŭ la partoprenintoj de la 14a kongreso en la jaro 1927!

Al la lokuloj kaj multaj turistoj la kongreso estis vidigita per la reklamiloj en la ĉefa placo kaj antaŭ la kongresejo, per la ekspozicioj de etigitaj laboriloj kaj pri Esperanto kaj per dekkvino da artikoloj en la lokaj gazetoj.

Por ne malmultaj eksterlandanoj la kongreso komenciĝis aŭ/kaj finiĝis en la vikle ekfunkcianta Barcelona Esperanto-Kontaktejo, kiun jarkomence lanĉis la librovendisto Karles Berga.

Bedaŭrinde ke pri tia aranĝo la esperanta antaŭkongresa informado estis nesufiĉa kaj malfrua.

Sed, nun eĉ pli entuziasmigita, la kreema Majorka Esperantistaro ekplanis novan aranĝon (kulturan kaj turisman) en sia rava insulo! La partopreno en ĝi estu granda kaj bela!

VIŠNJA BRANKOVIĆ orbispictus@iol.it

...kaj sukcesa

Post la interesa raporto de nia kunlaborantino, ĉu eblos ion plian diri? Ni tamen provos!

Ni komencu per malgranda statistiko: entute aliĝis 64 gekongresanoj. El ili 15 eksterlandanoj, 17 majorkanoj kaj la ceteraj katalunoj. Nia asocio organizis du kolektivajn vojaĝojn: aviadilan kun 20 pasaĝeroj kaj ŝipan kun 14.

Ni tuj klarigu, ke la majorkaj esperantistoj antaŭvidis la okazigon de la ĉi-jara kongreso pro la 75a datreveno de la antaŭa, okazinta en la sama urbo en la jaro 1927.

NIA AGADO

La Loka Kongresa Komitato (LKK) meritas varman gratulon, ĉar ili daŭre deĵoris en la kongresejo kaj mem pretigis la plej grandan parton de la programo kaj la dokumentaron kun la dokumentujo (tiu tola saketo tre utila). Tute unika kongreslibro en la historio de niaj kongresoj, ĉar la kongrestemo devigis ĝin etigi, sed laŭ mia gusto tro nigra, kvankam supozeble tio ne havis apartan signifon.

Specialan gratulon meritas la LKK, kiu sukcesis engaĝi tiel serioze la aŭtoritatulojn, almenaŭ la kulturan magistratanon Guillem Bernat, aktive kunlaborantan en pluraj aranĝoj. La magistrata regalo de bufeda vespermanĝo estis unuanime laŭdita kaj ankaŭ la senpaga disponigo de la kongresejo, kie krom la okazigo de la kongresaj aranĝoj, la gejunuloj tranoktis en bonaj kondiĉoj kaj ankaŭ senpage.

La prezento de la libro de Xavier Margais en la urbodomo estis vera kaj agrabla surprizo kaj la libro bone vendiĝis en nia libroservo (legu apartan recenzon). Vere emocia fariĝis la omaĝo al la lokaj jam de longe forpasintaj esperantistaj pioniroj Miquel kaj Andreu Arbona kun ĉeesto de ties filoj. Bone akceptiĝis la T-ĉemizoj kun la kongresa devizo ankaŭ represita en la kongreslibro, ŝuldata al la artista kreemo de David (pri ambaŭ artikloj vidu apartan anoncon).

La unua arta vespero en loka belega ejo estis vera regalo por niaj oreloj kaj okuloj kun la koncertoj de loka popolgrupo, kiu interpretis kante kaj instrumente tre belan repertuaron, kaj ankaŭ de la esperantlingva teamo Kaj Tiel Plu, kiu denove ĝojigis nin per la konataj kantoj, tamen ĉiam plezure reaŭdataj.

La dua arta vespero okazis en la kongresejo mem kun la premiera prezento de la verko *La Balkanikoj*, kies aŭtoro Albert Herranz mem interpretis ĝin kun aliaj lokaj aktivuloj; la kunlabora kaj humora interveno de Paul Gubbins kun la prezento de kelkaj skeĉoj kaj fine la recitalo de Gianfranco Molle.

Menciindas la manpleno da interesaj kaj diversaj prelegoj okazintaj dum la kongreso. Pri malgrandaj entreprenoj, tiu de Josep Franquesa; kaj pri malgrandaj vilaĝoj, tiu de Višnja Branković; kaj la filmo de la lokanoj pri "Malgrandaj vilaĝoj de Majorko"; pri lernado de lingvoj, tiu de Hektor Alos; pri Justa kaj

Solidara Komerco, tiu de Marta Pizarro (katalunlingva); pri teatro, tiu de Paul Gubbins dum la Literatura Mateno, kie krome anonciĝis, ke neniuj premioj estis aljuĝita por la Dua Premio Delfí Dalmau, pro la nesufiĉa nivelo de la ricevitaj kontribuoj.

Nun la estraro de nia asocio studas la eblecon eldoni ĉiujn kongresajn prelegojn kajjerforme.

Dankinda estis ankaŭ la kunlaboro de Karles Berga, per starigo de budo pri sia Barcelona Esperanto-Kontaktejo kaj informoj pri tie okazontaj Intensaj Zagreb-Metodaj Kursoj kaj aliaj servoj tie proponitaj.

Salutis la kongreson s-ino Teresa Massana, vidvino de Lluís M. Hernández Yzal, fondinto de Esperanto-Muzeo de Sant Pau d'Ordal; Manel Vinyals, la kataluna mondvojaĝanto kaj Darío Rodríguez el Madrido. Ni dankas ilian amikecon

Memorinda kongreso, kiu iel fariĝos ekzemplo de bona organizado, kaj restos longe en nia memoro kiel belega travivaĵo.

(kovrile: fotoj de la kongreso en Sóller)

VERDIKTO DUA PREMIO DELFÍ DALMAU

En la eldono de la Dua Premio "Delfí Dalmau" por gazetara artikolo pri temo en rilato al la ekologio de la lingvoj, la lingva (mal)egaleco, la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj, aŭ la ebla aŭ faka kontribuo de internacia lingvo kiel Esperanto sur ĉi tiu kampo, konkursis du originaloj.

Post la oportunaj konsideroj, la ĵurio decidis ne aljuĝi ĝin, ĉar neniuj el la tekstoj atingis la necesajn poentojn.

Sóller, la 3an de novembro 2002

BARCELONO

- En la tiea Unesko-Klubo okazas Esperanto-kursoj je du diversaj niveloj marde kaj ĵaŭde gvidataj de Neus Moly kaj Ramon Perera, kaj Lingva Ateliero (praktika supera kurso de Esperanto) la unuan labortagan merkredon de ĉiu monato, de novembro 2002 ĝis junio 2003, gvidata de Hektor Alos.

- La 17an de decembro dekelk esperantistoj kunvenis en la Unesko-Klubo okaze de la Zamenhofa Tago. Prelegis Ramon Perera kaj Ricard S. Güell kaj tuj poste estis lunĉeto.
- En la jaro 2004 okazos en Barcelono la "Tutmonda Renkontiĝo de Asocioj kaj Klubo Unesko" kaj pro decido de la organiza komitato Esperanto estos unu el la oficialaj lingvoj. Por tiu renkontiĝo oni kalkulas la partoprenon de almenaŭ 500 personoj. Ramon Perera jam tenis kontaktojn kun la ĝenerala sekretario de la Wakayaba Unesko-Societo en Japanio, mem aktiva esperantisto, kaj li scias, ke la Bonn-a Unesko-Klubo kutimas uzi Esperanton en internacia rilatoj, kaj konas brazilajn esperantistojn, kiuj planas fondi Unesko-societon en sia urbo.

MAJORKO

Estis eldonita en septembro la libro *El moviment esperantista a Mallorca* (La esperanto-movado en Majorko) de la historiisto Xavier Margais (vidu la kovrilon en la frontpaĝo de la antaŭa numero de *Kataluna Esperantisto*). Temas pri ampleksa resumo de la doktoriĝa tezo de la aŭtoro, prezentita en 2001 kaj al kiu oni aljuĝis la plej altan kvalifikon.

La verko prezentas ĝeneralajn aspektojn de la ideo pri internacia lingvo, kaj kiel ĝi influis la majorkan socion, sed precipe okupiĝas pri la disvastiĝo de esperanto-movado en la Balearajn Insulojn kaj kiel ĝi tie organiziĝis.

La aŭtoro profunde analizas la rilatojn de la lokaj grupoj kun la ceteraj katalunaj esperantistoj, same kiel kun la hispanaj kaj alilandaj. Aparte surpriza estas la bunteco de la loka esperantistaro, en kiu kunvivis armeaj oficiroj kaj instruistoj, burĝoj kaj laboristoj, katolikaj pastroj kaj framasonoj. Malgraŭ sia negrando, ĝi estis aparte aktiva kaj socie konata: ĝi organizis du katalunajn kongresojn kaj havis du membrojn de la Lingva Komitato; ĝi ankaŭ flegis tre bonajn rilatojn kun aliaj tiuepokaj progresemaĵoj iniciatoj kaj institucioj, kiel la Komerca Ĉambro kaj la Ruĝa Kruco. Bedaŭrinde tiu vigla movado estis frakasita

tuj post la armea puĉo de 1936, kiu flamigis la Hispanian Militon: Majorko falis en la faŝisman flankon, kaj kvar esperantistoj, membroj i.a. de SAT, estis mortpafitaj; pliaj estis malliberigitaj. Necesos jardekoj, por ke la majorka movado restariĝu - sed tiun proceson la aŭtoro ne plu rakontas.

La verko estas informriĉega. Inter la diversaj rimarkindaj dokumentoj, kiujn ĝi enhavas, troviĝas ekzemple la originala prelego de la verkisto B.C. Aribau (pinta figuro de la kataluna Renaskiĝo) pri universala lingvo en 1817 - de kiu ĝis nun estis konata nur esperanta traduko.

La libro estas krome tre bele eldonita kun nemalmultaj fotoj kaj bildoj. La eldonejo neniel rilatas al esperanto, kaj ĉefe aperigas verkojn pri loka historio. Ĉar ĝi estas sufiĉe specifa kaj ĉar nuntempe librovendoj mal-longe konservas novajn librojn, oni ne facile ĝin trovos en via kutima librovendejo, sed eblas ĝin mendi ĉie ajn en nia lando.

Indas fine aldoni, la verko estis prezentita en Palma, Sóller kaj Binissalem, kaj ke notico pri ĝi aperis en la novembra numero de la revuo pri historio *Avenç*.

Xavier MARGAIS: *El moviment esperantista a Mallorca (1898-1938)*, Edicions Documenta Balear, Col. *Arbre de Mar* núm. 6, Palma, 2002, ISBN 84-95694-29-8, 371 paĝoj. Prezo: 24 €. Mendebla ĉe KEA.

LLEIDA

Nia prezidanto Josep Franquesa peras rilatojn inter la aŭtoritatoj de Lleida kaj Jamagata (Japanio) por ĝemeliĝi ambaŭ urbojn. Detalojn pri la evoluo de la afero aperos en nia venonta revuo.

PERPINJANO

La dojeno de la rusiljonaj esperantistoj kaj membro de nia asocio, Renat Llech-Walter, ricevis la Krucon de Sankta Georgo de la kataluna registaro. Nia asocio kore gratulis lin, kaj ni kun plezuro diskonigas la novaĵon.

NIA AGADO

SABADELL

- Ĵus ekfunkciis en Sabadell municipa biblioteko ĉe “Vapor Badia”, al kiu nia asocio donacis ekzempleron de la biografio de la aŭtoro de Esperanto en la kataluna: *Zamenhof, autor de l’Esperanto*.
- Nova elementa kurso komenciĝis pasintan novembron gvidata de Llibert Puig. La loka televidstacio “Canal 50” intervjuis Manel Vinyals pri la 80-taga mondvojaĝo, fine de novembro.
- Memore al la naskiĝdatreveno de Zamenhof, 20 membroj de la loka grupo Centro de Esperanto Sabadell renkontiĝis por tagmanĝi dimanĉon la 22an de decembro en loka restoracio.

VILANOVA I LA GELTRÚ

- La 14an de decembro prezentiĝis en la tiea loka asocio “Foment Vilanovi” la kataluna traduko de la verko *Monsó* de nia samideanino Vimala Devi. Ni deziras al ŝi kiel kutime grandan sukceson.

- La Humanitara Organizo Espero prezentos siajn celojn kaj projektojn en Vilanova ĉe la ne registara organizo “Taula Comarcal de Cooperació i Solidaritat” la 29an de januaro 2003. Pliajn informojn rekte petu de Joan Inglada:

joan.inglada@esperanto-ct.org

80-TAGA MONDVOJAĜO

Post la sukcesa reveno de niaj mondvojaĝantoj Manel Vinyals kaj Joaquim Marcoval, ili devis vaste komplezi la peton de multaj radio- kaj televid-stacioj kaj ĵurnaloj pri sia aventuro, kaj nepre menciis la peran rolon de Esperanto. La ĉiutagaj raportoj estas legeblaj ĉe www.vilaweb.com/especials/rodamon

De post la reveno ili laboras super la kompilado kaj libroforma redaktado de la tuta materialo.

Ni petos de ili ekskluzivan intervjuon por nia revuo, aperonta en nia venonta numero kaj informprelegon en aprilo 2003.



Unua Balta Esperanto-Forumo

Ĝi okazis inter la 14a kaj 18a de aŭgusto 2002 en Kaliningrado – la ĉefa urbo de la plej okcidenta regiono de Ruslando. Ĉi tiu forumo estis verŝajne la plej internacia el ĉiuj aranĝoj, kiujn organizis ruslandaj esperantistoj. Inter la 113 partoprenantoj el 12 landoj, estis nur dudeko da ruslandanoj.

Prelegis Wolfgang Kirschstein pri Kaliningrad/Königsberg kaj ties regiono; Aleksander Korĵenkov pri V. Varankin kaj ties “Metropoliteno”; Valentin Melnikov pri “Eŭgeno Onegin” de Puŝkin; Maciej Wnuk pri korupto en Pollando; Igvar Enghart pri ekologio de la Balta Maro kaj Zdenek Polak pri rilatoj inter Ruslando kaj Ĉeĥio. Diverslandaj partoprenantoj faris raportojn, proponojn kaj demandojn en la seminario “Esperanto en Baltio”.

Kadre de BEF-1 okazis seminario pri literatura kritiko, kiun preparis Wolfgang Kirschstein, kiu kun aliaj redakcianoj de *La Ondo de Esperanto* respondis demandojn de legantoj. Pluraj forumanoj profitis la unuataĝan oferton de eldonejo Sezonoj, kiu lanĉis la unuan volumon de la kvinvoluma verkaro de Fjodor Dostojevski en Esperanto. La unua volumo, “Blankaj Noktoj”, enhavas ses verkojn de Dostojevski en novaj tradukoj. Du el la tri tradukintoj (Aleksej Birjulin kaj Aleksander Korĵenkov) subskribis la unuajn venditajn ekzemplerojn.

La Forumo altiris atenton de amas-komunikiloj, kiuj sendis siajn reprezentantojn al la malfermo en la Urbodomo, en kiu la forumanojn alparolis, interalie, la Ĝenerala Konsulo de Pollando, Jaroslav Czubinski.

Kaunas (Litovio)

Mirigis nin la eksterordinara esperantlingva turisma kajero pri Kaunas, la dua urbo laŭ grandeco kaj iama ĉefurbo de Litovio. En formato DIN-A4 kaj 26-paĝa, ĝi prezentas tutkolora la vidindaĵojn de la urbo kaj ties influa regiono. Per enkonduka saluto de la urbestro Erikas Tamaŝauskas, la kajero informas tre detale pri ĉiuj aspektoj de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Elstaras la multaj vizitindaj

muzeoj, kaj informas pri la tradiciaj aranĝoj kaj pri ekskursoj ĉefe al la regiona parko de Kaŭna Maro – la plej granda artefarita barlago en Litovio –, kiu disvastiĝis en 1959 post konstruado de Kaŭna hidro-elektrujo. Areo de la Maro 63,5 kv.km., longeco de bordoj 200 km, plej granda profundo 22 m.

Sinceran gratulon meritas kaj la aŭtoritatoj, kiuj decidis eldoni la esperantan version kaj la tradukinto(j) pro la bona laboro.

La kajero estas je la dispono de niaj membroj en la biblioteko de nia asocio.

Gratulinda datreveno

La angla advokato kaj veterana esperantisto Frank Buckley – kiu antaŭ kelkaj jaroj vizitis nin – festos sian 70 jaran esperantistiĝon en 2003. Li studis Esperanton kun Andreo Cseh en Arnhem (Nederlando) kaj partoprenis sian unuan UK en 1933 en Kolonjo (Germanio). Li estis daŭre aktiva en la movado diversfaka. Li meritas nian rekonon kaj gratulon.

Se vi volas gratuli lin, jen lia adreso: Frank Buckley, D.B.E.A, 620 Filton Avenue, Bristol BS34 7LD (Anglio)

Korespondpetoj

Dmitri Lytov, 28-jara esperantisto el Sankt-Peterburgo, serĉas korespondanton en nia lando. Li estas tradukisto (angla, germana kaj nederlanda lingvoj) kaj psikologo.

socion@hotbox.ru
socioniko.hotbox.ru

Stanislaw Pilat, 37-jara pola agrikulturisto, deziras korespondi pri historio, geografio, Esperanto kaj etnaj minoritatoj.

espilat@wp.pl

NOVA POŝTKESTO

KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

APARTAT 1008

08200 SABADELL

RECENZOJ

Studlibro vere unika

Ni troviĝas en la virtuala klubo "Esperanto-lando", kiu situas ie en Moskvo. Oni prezentas al ni dudek ses kunvenojn de la klubo, unu pli interesan ol la alia. La ĝenerala tagordo de la klubkunvenoj estas pli-malpli konstanta, kvankam ekzistas esceptoj – kelkfoje antaŭanoncitaj, kelkfoje (same kiel en "realaj" klubkunvenoj) kvazaŭ neanticipitaj.

Ekzemple, hodiaŭ ni partoprenu en la kvara kunveno (= "Leciono 4"). La prezidanto informas nin, ke hodiaŭ ni faros "ekskurson al Esperantaj memorigaj lokoj en Moskvo, ligitaj kun la malnova historio de Esperanto". Li ankaŭ mencias, ke en kunveno post du semajnoj ni denove ekskursos, sed tiufoje al memorigaj lokoj "ligitaj kun la nova Esperanto-historio". Ni ekskursas al domo, en kiu Ludoviko Zamenhof loĝis inter 1879 kaj 1881, kiam li studis en la medicina fakultato de la Moskva Universitato. Poste, ni ekvidas la universitaton mem, transiras al la muzeo de Tolstoj, kaj al konstruaĵoj ligitaj kun la historio de Esperanto en Rusio ĝis la mezo de la epoko de Stalin. Dume, nia gvidanto informas nin pri esperantaj eventoj rilatantaj al la vizitataj lokoj kaj la politika situacio.

Fininte la ekskurson, jen ni denove en la klubĉambro. Marjorie Boulton prelegas al ni pri peresperanta korespondado (t.e. ni legas tekston tiuteman, verkitan de ŝi.) Post la prelego ni transiras al literatura prezento: Ni legas selektaĵon el *Metropoliteno* de Vladimiro Varankin. Ĉi tiu rakonto rekte rilatas al la ideologiaj sintenoj de la 1930aj jaroj. Sekvas tiun legaĵon poemeto de Albert Goodheir pri "Totalismo". Kaj ni legas detalan komenton, kiu klarigas la nomojn kaj eventojn, menciitajn ĝis nun en la kunveno, kaj kiu atentigas pri lingvaj fenomenoj, kiujn ni bezonas speciale atenti.

En la tria parto de la klubkunveno venas lingvo-praktikado. Ni respondas al demandoj pri la enhavo de la legaĵoj, ni faras frazojn laŭ diversaj skemoj, kaj ĝenerale uzas Esperanton. Estas klare, per la demandoj, ke la legaĵoj celis ne nur ĝenerale distri nin, sed specife instrui nin pri nomoj, datoj kaj faktoj.

En siaj 26 lecionoj ("klubkunvenoj") Boris Kolker prezentas al ni unikan studlibron, ĉar ĝi ne nur celas utili al "progresantaj" studentoj de Esperanto, sed ankaŭ estas tre utila kleriga verko

por la sperta esperantisto, kiu deziras pligrandigi sian scion pri la historio de la esperanta movado, sian konon de esperantlingvaj verkoj, sian scion pri la historio de Esperanto, kaj/aŭ volas trovi ekzercojn kaj prilingvaĵojn, kiuj povas progresigi ankaŭ lian Esperanto-kompetenton.

La temoj neniel estas nure Esperanto-rilataj, kvankam plejofte ili rilatas, almenaŭ nerekte, – se nur pro la fakto, ke ili estis ĉerpitaj el esperantlingvaj verkoj. Ni do legas pri la origino de Esperanto, la frua movado, pri vizitado al aliaj landoj kun notoj pri diversaj kulturoj, pri "La ĉina gimnastiko *Tajĝiĉjŭan*"; ni legas tekstojn pri prononcado, tekstojn el *Esprimo de sentoj en Esperanto* de Edmond Privat, kaj ĉerpajojn el multaj literaturaj verkoj. Ni konatiĝas kun Cezaro Rossetti, Julio Baghy, Raymond Schwartz, Mikaelo Giŝpling, Lorjak, Hilda Dresen, Kolomano Kalocsay, kaj granda nombro da aliaj verkistoj niaj. Kelkaj prezentaĵoj estas tre praktikaj, ekzemple, informoj kaj detaloj pri Interreto en la lasta leciono.

Du karakterizaĵoj de la libro elstaras: ĝia amplekso (pritraktanta preskaŭ ĉiujn aspektojn de la esperantismo), kaj la multvario en ĉiu el la lecionoj. Preskaŭ nenio en la libro celas nur distri sen informi. La emfazo pri la historio de Esperanto en Rusio, eble, estas iom tro forta – mi ŝatus legi egale ampleksajn informojn pri, ekzemple, la historio de Esperanto en Ĉinio, Vjetnamio, Irano kaj aliaj lokoj, kie la esperantismon konfrontis sociaj sintenoj, kulturoj, kaj ideologioj problemkaŭzantaj; legi pri la tre frapa interligiteco de la esperanta movado kaj spiritismo en Brazilo, k.c. Kompreneble, tio signifus du- aŭ tri-obligi la amplekson de la libro, do ne estus praktika.

La libro estas nedika, sed neordinare peza (duonkilograma!), ĉar presita sur altkvalita papero. Ampleksa kolekto de bildoj pri lokoj, homoj kaj libroj de Esperanto-lando kontribuas al la unikeco de tiu lernolibro-gvidlibro.

Salutinda verko, kiu abunde plenumas la promeson de sia subtitolo: "Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo".

DONALD BROADRIBB (El *Monato*, aŭgusto 2002)

Boris Kolker: *Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta Kulturo*. Universala Esperanto-Asocio, 2002. 291 paĝoj. 21 x 14,5 cm. (18 eŭroj ĉe KEA)